# EKO 2025

**Mesaĝe, kuraĝe**

EKO 2025-17. Aprilo 24. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sen alkroĉaĵo: Sume 300 KB

## Said Abbasi prelegis en nia universitata grupo

Said Abbasi naskiĝis en 1978 en Irano. Li parolas la persan (C2), la araban (C1), la ĉinan (C1), la anglan (C1), la turkan (A2) kaj la japanan (A1) lingvon. Li memlernis Esperanton en 1992, bakalaŭriĝis pri la ĉina lingvo en 2001 kaj diplomiĝis pri la araba lingvo en 2001, (Instituto pri fremdaj lingvoj de Irano).

Ekde 2001 li tradukis multe ĉefe inter la persa, la ĉina, la araba kaj Esperanto, i.a. la dekpaĝan novelon *La samovaro* el la persa al Esperanto, kiu aperis en la 31-a numero de *Beletra Almanako* (feb. 2018, pp. 40-49). Li instruis Esperanton al blindaj lernantoj en la Teherana Universitato ekde 2002 per transskribo de Esperanta baza kurso en la brajlan alfabeton. Li eklokiĝis en Ĉinio, Ŝanhajo, kaj agadis en la Ŝanhaja Esperanto-Asocio ekde 2007 ĝis nun. Li partoprenis en la kursoj de la Universitato de Esperanto en Ĉinio, Hajnan-Insulo, en 2012. En 2016 li ricevis KER-diplomon, sed ne sukcesis fini la kurson pro viz-problemo. En 2018 li gvidis paroligan kurson de Esperanto en Ŝanhaja Universitato de Fremdaj Lingvoj. Li volontule kunlaboris en la projekto de tradukado de *Unesko Kuriero* dum du jaroj 2018-2020. Li partoprenis en multaj ĉeestaj naciaj kaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj de Esperanto en Ĉinio, Irano, Japanio, Koreio kaj Taĝikio.

Sendis: Ahmad Mamdoohi mamdoohi@yahoo.com

## Licea agado en Kubo

Mi informas vin pri la videbligo de Esperanto kaj de KEA en kultura foiro en la franca liceo de Havano. Mi povis partopreni nome de KEA, interŝanĝi kun homoj de plej diversaj landoj, kiuj interesiĝis pri la internacia lingvo. Tio okazis la 12-an de aprilo kun gepatroj kaj gefiloj studantaj en tiu ĉi lernejo kaj kun instruistoj de la lernejo mem. Kuba Esperanto-Asocio estis afable invitita de Cristiano Bassanini, itala esperantisto loĝanta en Kubo kies filoj studas en tiu centro. Cristiano estas membro de nia Asocio kaj ofte partoprenas niajn renkontiĝojn. Li subtenas Esperanton diversmaniere. Mi pensis ke temis pri tuttaga programo de klasoĉambraj prezentoj rilate al lingvoj, sed alvenante tie, mi miris pri la bunta organizado de vigla kultura foiro kun kantoj, kulturaĵoj kaj manĝaĵoj de plej diversaj landoj. Ni kunportis afiŝojn, esperantan flagon, esperantajn librojn kaj kelkaj instruistinoj, gelernantoj kaj gepatroj scivoleme alproksimiĝis por demandi pri la lingvo. Estis bona okazo por videbligi la Esperantan agadon enlande kaj al eksterlandaj familioj kaj por ke homoj plu sciu ke nia Internacia Lingvo daŭre estas uzata en la plej diversaj scenejoj de la vivo kaj fakoj de edukado, kiel vere utila ilo por komunikado.

Ariadna Guttierez

## Pola progreso per artaĵoj

La bazlernejo n-ro 2 en Poznano, Pollando, petas 7-12-jarajn infanojn el la tuta mondo sendi desegnaĵojn aŭ pentraĵojn pri 'La plej grava vorto por mi, paperpoŝte, al la adreso de la lernejo. En la supra parto de la folio estu skribita per grandaj literoj, en Esperanto, la plej grava vorto por infano. Sub ĝi aperu bildo pri ĉi tiu vorto. Sur la malantaŭa flanko de la folio oni bonvolu skribi la personan nomon de la infano-aŭtoro, la aĝon kaj la landon, el kiu la aŭtoro venas kaj la retpoŝtadreson, al kiu ni sendos diplomon kaj fotojn de la ekspozicio.

Rajtas partopreni ankaŭ infanoj ne konantaj Esperanton. Eblas sendi kontribuojn de kelkaj infanoj en la sama koverto. Bonvolu konsideri, ke sendo de laboraĵo signifas konsenton de unu el la gepatroj aŭ de la prizorganto de la infano je partopreno de ties bildo en la ekspozicio, krome akcepton, ke la infano skribu sur la bildo siajn nomon kaj aĝon kaj konsenton je publikigo de fotoj pri la ekspozicio en la retejo kaj *Fejsbuk*-ejo de la Bazlernejo n-ro 2 en Poznano.

Se temas pri lernejoj, laŭ oficiala postulo estas necese, ke la instruisto ricevu konsenton de unu el la gepatroj aŭ de la prizorganto de la lernanto je ties partopreno en la evento. Ni atendas la bildojn ĝis **la 20-a de majo 2025.** Retpoŝtadreso de la prizorgantino de la ekspozicio, Magdalena Knosala: magdaszczot@tlen.pl

Adreso de la lernejo: *Esperanto,*SZKOŁA PODSTAWOWA NR 2 OS. JAGIELLOŃSKIE 128, PL 61-223 Poznan, POLLANDO

Magdalena Knosala

## Temo por Brno – pontoj al paco

La 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2025 en Brno, Ĉeĥio, kun la temo 'Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj'. Ĉiuj estas invitataj aliĝi antaŭ la fino de la tria aliĝperiodo (la 30-an de junio 2025): https://uk.esperanto.net.

La reĝisoro de la kongresa temo de 2025 estas Prof. Bengt-Arne Wickström. La temo estis prezentita de la Vicprezidanto de UEA, Fernando Maia Jr. estrarano respondeca ankaŭ pri kongresoj, en la Dua Bulteno. Resume Unuiĝintaj Nacioj (UN) deklaris la jaron 2025 Internacia Jaro de Paco kaj Konfido, celante instigi la homaron unuiĝi kaj alfronti la mondajn krizojn. António Guterres, Ĝenerala Sekretario de UN, emfazis la gravecon de homaj rajtoj kaj solidareco por solvi konfliktojn, redukti malegalecojn kaj antaŭenigi financan kaj klimatan justecon. Esperanto estas neŭtrala, facila kaj malmultekosta internacia lingvo ligita al kultura interkompreniĝo, justa komunikado kaj internaciismo. Tio kombinita kun la modernaj teknologioj kiel ciferecaj platformoj, virtualaj komunumoj kaj artefarita intelekto, se trafe kaj konscie uzataj, povas plifaciligi mondskalajn kunlaboron kaj edukadon por konstrui pacon kaj kontraŭstari diskonigon de malveraĵoj aŭ nutradon de malamo. La kongresa temo esploros kiel teknologioj povas subteni pacon kaj konfidon, la instruon de Esperanto kaj valorigi kulturan diversecon, samtempe atente al etikaj defioj (ekz-e falsaj novaĵoj) kaj la bezono por socia inkluziveco.

## Zamenhof en la memoro

Pasis la 108-a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof, forpasinta la 14-an de aprilo 1917 en Varsovio. *La Ondo de Esperanto* proponas (re)legi la artikolon de la Ruslanda ĵurnalisto Aleksander Korĵenkov pri la lastaj vivojaroj kaj forpaso de la aŭtoro de

Esperanto. Ĝia titolo estas *Ho, mia kor', ne batu maltrankvile…*
Ĉi tiu artikolo unue aperis en aprilo 2017, je la centa mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof. De tiam ĝi estis legita 4 538 fojojn (la tria plej populara teksto en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*). Legu ĉe https://sezonoj.ru/2021/04/zamenhof-26/

## Fervojoj en Wellington renovigitaj

Kompleksa signal-renoviga projekto en Nov-Zelando okazis en la ĉefurbo Wellington. Tio anstataŭis sistemon jam 90-jaraĝan. La nova sistemo pliigas sekurecon kaj entenas haltigajn meĥanismojn por protekti kontraŭ signaloj preteririgitaj kiam ruĝaj. Kadre de la projekto, la traka sistemo antaŭ la naŭ-kaja finstacio estis raciigita por doni plian flekseblon. Plia problemo estas la fortegaj ventoj, kiuj malhelpis la laboron.



***SMG:*** Mi loĝis en tri landoj, Nov-Zelando, Nederlando kaj Hungario. La unuaj du suferas ferocajn ventojn, sed mia nuna loĝurbo estas mirinde senventa.

## Mensaj atingoj

La asocio Mensa oficiale akceptis la kreon de grupo, forumo kaj spaco en siaj privataj komunumoj. La organizaĵo nun montras Esperanton al 90 naciaj organizaĵoj kaj 150 000 membrojn. Membroj de UEA kaj Mensa nun havas siajn proprajn grupojn, spacon kaj forumon en siaj oficialaj retejoj. Mi ankaŭ komencis virtualajn konversaciojn per la oficiala Zoom-ĉambro de Mensa.

ESPERANTO SIG (Interes-grupo) en *Mensa International*

https://member.mensa.org/special-interest-group/esperanto-sig
https://hub.mensa.org/s/esperanto/cfiles/browse/index?fid=351
SIG ESPÉRANTO (akceptas membrojn de aliaj landoj)
https://mensa-france.net/membres/gis/
https://forum.mensa-france.net/viewforum.php?f=61
gis-esperanto@discussions.mensa-france.org
Jen sociaj retoj de ESPERMENSO, kie mi ĉiutage akceptas membrojn:
https://chat.whatsapp.com/FQck7wzY0s8AeOWop51afq
https://t.me/espermenso
https://t.me/+HWAiLwO6YR_tL9F4
https://www.facebook.com/groups/3144103055806084/

Sendis Francoise Noireau

## Onde, tutmonde

Aperis la marta eldono de la gazeto *La Ondo de Esperanto* (N-ro 323). Sur ĝiaj 137 paĝoj (legeblaj laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”) estas pli ol 60 tekstoj, garnitaj de multaj ilustraĵoj. Konatiĝu kun ĉi tiu riĉenhava eldono ĉe https://sezonoj.ru/2025/04/ondo-140/ kaj decidu pri (re)abono

## Slovena sukceso

La bulteno de SEL eniras sian 30-an jaron. Dum tiu tempo, ĝi progresis en pluraj aspektoj: laŭ amplekso kaj enhava vario, kaj laŭ la teknologio de desegnado kaj liverado de la bulteno. Tamen, nia bulteno ĉesos esti eldonita en presita formo ĉar estas tro malmultaj legantoj de la papera versio. Ni ĝisdatigos la fasonon de la bulteno kaj provos fari ĝin pli plaĉa por la legantoj.

## Nezha, la ĉina diablo

Estas neniu dubo, ke la ĉina animacia arto estas vivanta oran momenton. En la pasintaj jaroj por la unua fojo desegnobildaj serioj inspiritaj de *La granda majstro de la demona skolo* (魔道祖师*Modao zushi*, 2016) kaj *La beno de la dia oficisto* (天官赐, *Tian Guan Cifu*, 2020) de la ĉina verkistino Mo Xiang Tong Xiu atingis la unuajn lokojn inter la plej popularaj animacioj en Japanio. Ili kreis tie unikan subkulturon de fervoruloj, kiuj lernas la ĉinan lingvon por povi mem traduki la romanojn kaj kompreni la dialogojn, aĉetas rilatajn varojn kaj vizitadas kunlabor-kafejojn en Ĉinio kaj Japanio. Sed nun la tutmonda sukceso de *La demona infano Nezha skuegas la maron* (哪吒之魔童闹海, *Nezha zhi motong naohai*, 2025), la dua animacio de la ĉina reĝisoro Jaozhi pri la samnoma tradicia heroo, estas donanta novan dimension al la fenomeno. Ĝi ne plu limiĝas al la malgranda ekrano, sed ĝi estas glore atinganta tutmondajn IMAX-kinejojn per siaj tri-dimensiaj roluloj, fortaj sentoj kaj grandiozaj batal-scenoj.

Alessandra Madella

========= vortoj: 1465 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dek tri numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.